

NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^oB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

FEBRUARO 2003

EN APARTA FOLIO NI INKLUDAS PROTOKOLON DE LA ĜENERALA KUNVENO DE MEL, kiu okazis lastan 27an de januaro.

NEKROLOGO

FELIX GÓMEZ MARTÍN. Kvankam la forpaso okazis antaŭ unu jaro, la novaĵo atingis nin la pasintan januaron. Felix, aeronautika ingeniero, esperantiĝis en la jaroj 40aj kaj en 1953 estis unu el la gefondmembroj kiuj, kun granda strebado, oficialigis Madrida Esperanto-Klubon. En 1962 kune kun aliaj esperantistoj revivigis la movadon en Madrido, ŝanĝante la nomon de la asocio al Madrida Esperanto-Liceo, kies sekretario estis Félix. En la sama jaro li estis nomita, kun la aprobo kaj konsento de la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj, oficiala reprezentanto de Hispana Esperanto-Federacio en la hispana ambasado en Danlando kaj en la 47-a Universala Kongreso en Kopenhago. Inter 1964 kaj 1968, la sidejo de MEL estis la hejmo de F. Gómez Martín. Li partoprenis aktive en multaj naciaj kaj universalaj kongresoj kaj estis peranto de la ĉina revuo "El popola Ĉinio" ekde 1975 ĝis la malapero de la papera eldono. Li estis prezidanto de MEL dum la jaroj 1967-68.

Je la komenco de januaro ankaŭ forpasis alia samideano, ÁNGEL FIGUEROLA AUQUE. Li esperantiĝis en 1930. Post la hispana milito li denove aktivis en nia movado speciale inter blinduloj, kies grupon "Hispana Esperanto Aŭroro" li prezidis. Ankaŭ estis prezidanto de la organiza komitato de Hispana E-Kongreso de 1957. En 1968 kune kun la UK okazinta en Madrido, li organizis 36-an Universalan Kongreson de Blindaj Esperantistoj kiun li mem prezidis. De 1970 ĝis 1977 li prezidis Hispana Esperanto-Federacion; dum tiu ĉi periodo oni aĉetis apartamenton por HEF-sidejo. Dum la jaroj 1957, 1962 kaj 1969 li estis prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo.

E-REVUOJ EN LA RETO

Jesús de la Heras informas nin ke li ĵus publikigis la lastan numeron de "Kajeroj el la Sudo", 56-an, je <http://www.iespana.es/Esperanto/k56.htm> kun apogo de gaja muziko de Haendel. Se iu el vi intencas subteni la magazinon, notu, ke plej bone oni agu en januaro ol en decembro. :-)

La sola maniero subteni la magazinon estas aboni la surpaperan version, kiun oni sendas kvarfoje jare. Ankaŭ li ĵus enretigis la trian numeron de "Ateismo", kiu estas la oficiala bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto Organizo (ATEO), ankaŭ tute legebla senpage en la reto, je <http://www.iespana.es/ateismo/a3.htm>. Bonan legadon.

La sendependa elektronika kataluna ĵurnalo "Vilaweb" havas dulingvan (kataluna/esperanto) retpaĝon kiu prilumas la 80-tagan vojaĝon ĉirkaŭ la mondo de du katalunaj esperantistoj.

KONGRESOJ EN MAJORKO

La 31-a Kataluna kaj la 4-a Transpirenea Kongreso de Esperanto okazis en novembro en la urbo Sóller sur la insulo Majorko, 75 jarojn post la tie okazinta 14-a Kataluna Kongreso en la jaro 1927. Aliĝis 64 gekongresanoj. Prelegis Josep Franquesa, prezidanto de Kataluna E-Asocio, pri "Malgrandaj entreprenoj" kaj Hector Alós pri "Lernado de fremdaj lingvoj: kiucele?". Koncertis la kataluna teamo Kaj Tiel Plu kaj premiere prezentiĝis la teatraĵo "La Balkanikoj" de Albert Herranz. Elstaris omaĝo al la lokaj pioniroj fratoj Arbona kun prezento de la verko de Xavier Margais pri la movado en Majorko. (Esperanto. Januaro 2003)

BAZA KURSO EKDE FEBRUARO
Merkrede 18,00-20,00. Tri monatoj
Rodríguez San Pedro 13
Instruos Juan del Castillo
32 euroj

NIA VOĈO
2003

FEBRUARO

EVENTOJ ĈESAS APERI

Post 11 jaroj ĉesas aperadi la 2-semajna gazeto "Eventoj" legata en 60 landoj. La uzado de interreto mortigis la paperan eldonon. Daŭre funkcios la retroŝta novaĵ-servo "Ret-info" kaj "Plena Kalendaro"

FINANCIAL TIMES REKLAMAS EN ESPERANTO

La abonkampanjo 2003 de la fana financa ĵurnalo baziĝas sur nia lingvo. Oni sendis al profesiuloj jenan dulingvan leteron: *Imagine the power of a lingua franca- one language could lift barriers and unite nations.* Malgraŭ la invento de Esperanto tiu revo ankoraŭ ne plene realiĝis. Ekzistas tamen alia eŭropa voĉo, kiu superas naciajn limojn kaj kiu estas rekonata kaj aŭskultata de gvidantoj kaj decidantoj tra la mondo- la ĵurnalo "Financial Times". La teksto sub verda stelo estas senerara, kun kuriozaj supersignoj

LA ANTIKRISTO: TRADUKO EL ESPERANTO PREMIITA KIEL FILMO

Mallongdaŭra filmo de Adam Gluzinski, "La antikristo", ricevis la unuan premion en la 44a Internacia Festivalo de la Dokumentaj kaj Mallongdaŭraj Filmoj en Bilbao. Tiun ĉi premion oni rekonas samtempe kiel oficialan kandidatiĝon al la premio Oscar por la plej bona mallongdaŭra filmo. La scenaro de la filmo baziĝas sur la rakonto en Esperanto de Andre Tóth, "Lappar, la antikristo". Ĉi tiu rakonto aperis libroforme en la samtitola novelaro (Budapeŝto, 1982).

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ekde la 13-a de januaro denove okazas niaj konversacia-rondoj ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj: 17-a de februaro. 19,00h "Universalaj planlingvoj" . Alejandro Casanova
17-a de marto. 19,00h. "Kiu verkis la Bibliion?". Pepe Platas

Lumbildoj: 7-a de marto. VENDREDO, 19,30h en CASA DE GUADALAJARA,
Plaza Santa Ana 15. "Chile, el abrazo al Pacífico". Lupe Sanz

E-BANKEDO

La lasta sabato de januaro, kiel kutime dum la lastaj jaroj, la madridaj esperantistoj kunvenis en restauracio por festi esperantan novan jaron. Partoprenis 23 samideanoj inter ili membroj de la estraro de HEF, eksterlandanoj (Otto, el Norvegio, kiu vizitas Madridon kun lian edzino Pilar kiu esperantiĝis en la Liceo kaj la alia estis nederlandano kiu turismadis tra Hispanio). S-ro Gerardo Flores, unu el la plej aĝa membroj de MEL kaj la numero 1 de nia membraro, akompanis nin kun lia edzino. Post la bankedo kelkaj iris al apuda kafejo kie babiladis pri diversaj esperantaj aferoj. Bedaŭrinde mankis la membroj de la koruso "Verda Stelo" kiuj havis alian programeron en la sama dato... kaj kompreneble nia kara Augusto Casquero kiu loĝas en Pollando.

MEL donacos KVIN (5) Grandajn Vortarojn Hispana-Esperanto (F. de Diego) al membroj kiuj pagis la kotizon de la jaroj 2001, 2002 kaj 2003 antaŭ la 28-a de februaro.

La kotizo de MEL por la jaro 2003 estas 12,00 euroj

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal

En los locales de la Federación Española de Esperanto, el día 27 de enero de 2003, a las 19,30 horas, en segunda convocatoria, se celebró, previo anuncio en el boletín "Nia Voco, la asamblea general ordinaria de ESPERANTO LICEO DE MADRID.

La Presidenta abrió la sesión procediendo la Secretaria a tratar los diversos puntos del orden del día:

1.- Informe sobre los socios.

Socios en situación de alta a 31 diciembre 2002 48

Al corriente de pago	32	
Con una cuota pendiente	7	Nª 2, 404, 479, 510, 514, 516, 517
Más de una cuota pendiente	6	41, 196, 197, 436, 476, 506
Socio de honor	3	Nº 29 Augusto Casquero, 187 G.C. Fighiera y 520

HEF

Variaciones en 2002:

Altas	0	
Bajas por falta de pago	3	Nº 178, 179,, 440
Baja por fallecimiento	1	Nº 519

Se recuerda al fallecido, Venancio Monsalve, que fue redactor de Nia Voco en los años 40.

2.- Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea anterior. El acta nº 37 se publicó en el boletín del mes de febrero de 2002 para comentarios. Al no recibirse ninguno fue aprobada por unanimidad.

3.- Balance económico 2002. La secretaria comentó el informe publicado en el nº de enero de 2003. El saldo a favor del Liceo a 31-12-2002 es: en c/c banco Atlántico 3.068,74 euros, en depósitos a plazo 21.035,42 euros, en caja 9,49 euros, en cuenta UEA-Rotterdam 177,24 euros; total 24.290,89 euros. El balance de ejercicio fue aprobado por unanimidad.

4.- Presupuesto 2003. El presupuesto previsto para 2003 asciende a 1.975,00 euros. La partida más importante es la producción de audiovisuales sobre la historia de Madrid, contrarrestada por los ingresos previstos en su proyección. La cuota anual de socios de número se mantiene, por noveno año consecutivo, en 12,00 euros . El presupuesto, publicado en el boletín de enero de 2003, fue aprobado por unanimidad.

5.- Actividades desarrolladas en 2002. Se aprobó por unanimidad la memoria publicada en el número de diciembre de 2002 del boletín en la que se resumen las actividades llevadas a cabo durante el pasado año. Los presentes felicitaron a la Directiva por el amplio programa llevado a cabo a pesar de la escasez de medios.

6.- Programa para 2003. El programa de actividades, presentado por la secretaria, continúa en la línea de difundir, propagar y facilitar la práctica del esperanto a quienes lo deseen, así como fomentar las actividades lúdico culturales entre socios. Se destacó el esfuerzo para dar a conocer el esperanto mediante el patrocinio de audiovisuales sobre la historia de Madrid. Se indicó que se continuará en la línea de ayuda y apoyo a la Federación Española de Esperanto. El programa presentado fue aprobado por los presentes.

El boletín "Nia Voco" continuará siendo redactado por Lupe Sanz Bueno en colaboración con Manolo Parra.

7.- Ruegos y preguntas

La Secretaria propone que, como ayuda a la edición del Granda Vortaro de F.de Diego, el Liceo adquiera cinco ejemplares para ser regalados mediante un sorteo entre los socios que a fecha 28 de febrero estén al corriente de pago de los años 2001, 2002 y 2003. El importe de 165 euros se cargará a las partidas presupuestarias de Libros y Regalo de mercaderías. La propuesta fue aprobada por unanimidad.

Al no haber ningún otro ruego o pregunta se dió por terminada la Asamblea General a las 20,30 h.

Junta Directiva (2001-2004 inclusive)

Presidenta:	Carmen Suárez Fernández-Cid
Secretaria:	Guadalupe Sanz Bueno
Tesorero:	José Francisco Platas
Vocal 1:	Angelita Sanz Mayor
Vocal 2:	Juan del Castillo Martínez

El original lleva la firma de la Secretaria y el Vº Bº de la Presidenta